



# TEA-BULTENO

13<sup>A</sup> JARO

SEPTEMBRO - OKTOBRO 2010

NUMEROJ 9-10

La animon oni devas ŝanĝi, ne la ĉielon sub kiu oni vivas.

*Lucius Annaeus Seneca (4 aK - 65 pK)*

## Karaj TEA-anaro kaj Legantaro!

Baldaŭ finiĝos la plej intensa kaj densa feriadperiodo, dum kiu ni ĉiuj klopodis "ŝargi la bateriojn" cele la akiron de la necesaj forto, energio kaj entuziasmo por alfronti la venontajn monatojn, dediĉotajn al agado por/priesperanta en klubejo kaj eksterklubejo. Ĉu vi agrable pasigis vian libertempon? Ĉu vi partoprenis en kelkaj esperanto-aranĝoj? Ĉu vi travivis aparte interesan sperton danke al nia lingvo? Se jes, ekde vendredo la 3<sup>a</sup> de septembro mi atendas vin ĉe TEA-sidejo por aŭskulti raportojn, por spekti fotojn, filmojn pri lokoj vizititaj kaj aran-



### RAPORTO PRI KUBO

La pasintan jaron mi pensis partopreni

en la kuba UK, ĉar mi tre deziris viziti tiun belan kariban insulon. Mi aŭdis pri tiu fascina lando, plena je suno, sonoj kaj koloroj, kun bela maro, palmoj kaj blanka sablo: pro tio mi decidis fari mian unuan transoceanan flugon.

Post longa vojaĝo ni alvenis en la flughaveno de Havano kie ni trovis la karan amikon Manolito, nin atendantan kun alia loka esperantisto: ambaŭ bonvenigis nin tre varme.

Jam de la unua tago mi vidis en la urbo multe da arboj kaj floroj kiuj ankaŭ ĉe ni estas, sed evidente ilia natura medio estas tiu tropika, do tie ili kreskas multe pli grandaj kun grandaj radikoj, folioj kaj floroj. Piedirante laŭ la stratoj, oni povis rimarki la origin-diversecon de la kuba gento, aŭ el Hispanio aŭ el Afriko, dum la jarcentoj ankaŭ miksitaj, sed nun ili estas "la kubanoj".

En la malnova parto de la urbo estis belaj pasintjarcentaj domoj, en pluraj arkitekturaj stiloj, pentritajn per delikataj koloroj, sed bedaŭrinde preskaŭ detruitajn, ĉar jam de pluraj jardekoj neniam rekonstruitaj. Ni promenis tra la urbo kaj multe fotis domojn, balkonojn, kradpordojn, ĉiujn tre interesajn.

Havano estas granda urbo kun belaj palacoj, vastaj placoj, imponaj monumentoj, kaj tie cirkulas aŭtomobiloj de la 50<sup>aj</sup> jaroj de la pasinta jarcento, ĉaroj kun ĉevaloj, kvazaŭ la tempo estis haltinta... kvankam, kompreneble, veturas ankaŭ modernaj aŭtomobiloj.

Dum la Kongreso ni faris belajn ekskursojn: unu en Valo Viñales, valo inter la montetoj, Natura Heredaĵo de Unesko, kie oni kultivas kafon kaj tabakon; alia en Zapata duoninsulo, granda rezervejo de flaŭro kaj faŭno kie eblis viziti krokodilbredejon.

Dum la postkongreso ni estus devintaj viziti plurajn urbojn: Santiago, Camagüey, Trinidad, Cienfuegos kaj Santa Clara sed bedaŭrinde ni ne sukcesis ĉion fari, ĉar ĝuste tiam estis naciaj festo-tagoj. Ni trairis la tutan insulon per aŭtobuso, kaj flanke de la longaj stratoj estis multaj palmoj, ĉar palmo estas la nacia arbo de Kubo, kultivejoj de sukercano, bredejoj de ĉevaloj, bovoj kaj kaproj. Laŭ la strato, multe da homoj atendis, kun mono enmane, iun ajn transportilon, ĉar la publikaj trafikiloj eble estas tre tre maloftaj. Tio malĝojigis min, ĉar mi supozis ke la atendado povus esti tre longa.

Mi forgesis diri ion pri la manĝaĵoj: ni manĝis kokidan kaj porkan viandojn, fiŝojn, rizon kaj precipe bongustegajn fruktojn

ĝoj partoprenitaj ks. Sendube ĉiu el vi havos por rakonti ion, kio povos plivigli niajn vendredvesperajn programojn. Tamen ioma aktivado jam komenciĝis, kaj tio ĝuste pasintan jaŭdon, la 26<sup>an</sup> de aŭgusto: tiam 35 kongresanoj el 14 diversaj nacioj, partoprenantaj en la Itala Kongreso (*Lignano Sabbiadoro*), venis buse al Triesto kaj vizitis la Naturcentron en Basovizza (*ĉu vi scias, ke eblas ricevi tie reklamilon, tre belaspektan, esperantlingvan?*), la Nigran Groton kaj Valon *Rosandra*.

Do, ni ĉiuj kune, ek al ag' kaj labor', miaj karaj, jam temp' està!

Elda

kiel mangon, papajan kaj gujavan fruktojn, ananason, melonon, bananon kies gustoj estis tute specialaj.

Kaj pri la UK?

Inaŭguro estis solena kun partopreno de estrara kuba Delegito. Kongresa temo: "Interproksimigo de kulturoj". Estis prelego tre interesa pri Kuba Kulturo dum kiu oni memorigis pri la Afrika deveno kun ties moroj, kutimoj, religioj, dancoj kaj lingvoj. Estis prelego pri Kuba Sanservo kaj ankaŭ pri aliaj diversaj Medicinaj sistemoj. Interesa la prelego de H. Tonkin pri Shakespeare: per tradukoj de liaj verkoj, li fariĝis proksimiganto de kulturoj.

La Nacia Vespero prezentis ludadon de diversaj muzikpecoj far junaj muziklernantoj. Dum la Internacia Vespero elstara kuba aktorino Georgina Almanza deklamis poeziaĵon. La serba aktoro Saša Pilipovic prezentis monologon, dum la itala Giuliano Turone rolis en komika dramo "La leciono" de Ionesco. Franca koruso "Interkant" faris koncerton: "Ĝenerala Kanto" de Pablo Neruda kun muziko de Mikis Theodorakis kaj grupo de meksikaj dancistoj prezentis tipe nacian balon, ravante ĉiujn ankaŭ pro la tre belaj kostumoj.

Mi dankas vin pro via atento kaj salutas vin.

Egle

## Triesto kaŝita

*Trasfoliumante libron  
pri historiaj rememoroj*

### Canal Grande

La Granda Kanalo, haveno de la Tereza Kvartalo, estis konstruita laŭ projekto de la hidraŭlika inĝeniero *Matteo Pirona*, sekve de ordono de imperiestrino Maria Terezo je la 14<sup>a</sup> de oktobro 1756.

Origine marakvo atingis la placon antaŭ la preĝejo Sankta Antonio la Nova, sed post la unua mondmilito, pro trafikaj kialoj, parte ĝi estis terplenigita, kiel videblas hodiaŭ.

Fine de la kanalo, rigarde al la preĝejo, dekstre kaj maldekstre estas du viraj kapoj skulptitaj en blanka karsta ŝtono. El tiuj maskegoj iam eliĝis akvo venanta el fontanego, situanta en strato *della Zonta\**, kiu estis uzata de la maristaro por la velŝipoj, kablofiksitaj ĉe la kanalaj bordoj.

La subteraj akvotuboj estis domaĝitaj dum la konstrulaboroj de la preĝejo Sankta Antonio (ĉ. 1829) kaj de tiam ne plu riparitaj. Nun ili utilas nur kiel elfluejo de la fontano

en la antaŭpreĝeja placo.

\**Zonta* = dialekta vorto, signifanta "aldonaĵon". El tiu fontano la lokaj vinvendistoj elsuĉis la akvon por, propraprofite, dilui la vinon.

### La batalo de

### San Giuseppe della Chiusa\*

En la preĝejo de tiu vilaĝo troviĝas tre interesa pentraĵo, datita la 14<sup>an</sup> de aprilo 1797, kies bildaro reprezentas iun militeventon preskaŭ tute ne konatan.

La franca armeo estis ĵus alveninta en Triesto, post konkero de la norda parto de Italujo. Enposteniĝinte provizore en la urbo, ĝi estis atakita de la aŭstria trupoj kiuj estis malsuprenirantaj la altebenaĵon. Ĉe *San Giuseppe della Chiusa* aŭ, pli precize, ĉe *Kluc'*, okazis terura batalo kia videblas sur la pentraĵo.

La aŭtoro, nekonata, prezentas la plej kulminajn momentojn de tiu okazaĵo. Maldekstre rekonblas la triesta loĝata parto, ĝia haveno kun la velŝipoj, kaj inter la domaro rimarkeblas grandioza eksplodo. Tiu bildo atestas pri reale okazinta evento: municia-ŝarĝita ĉaro, parto de konvojo direktiĝanta al la batalkampo, trairante placon de la Borso, urbocentre,

dissaltis probable pro sabotado: ĉirkaŭe surtere pentrita estas kvardeko da mortintoj kaj vunditoj.

Centre de la scenaro videblas longaj vicoj de francaj vunditoj, alproksimiĝantaj al la urbo; du artileriaj postenoj pafantaj kontraŭ la aŭstria militistaro; la imperiestra infanterio kiu ekpafas kaŝite malantaŭ mureto, kaj ĉie kaj ĉie mortintoj kaj vunditoj. Meze de la aŭstria taĉmentoj elstaras la figuro de generalo *Gessich* kun enmane sabro klare spronanta sian soldataron al sturmo.

Dekstre de la pentraĵo oni ekvidas la vilaĝon *San Giuseppe* kune kun ĝia tipa preĝejo kaj ties sonorilturoj. La vilaĝanoj klopodas helpi la aŭstrojn, dum la virinoj preĝas surgenu en la kampoj, por favora rezulto de la batalo.

Temas pri mallonga ĉapitro de la historio de Triesto, ne tiom vaste konata, sed detale kaj ilustre transdonita al postaj generacioj far tiu ĉi nekonata artisto per verko, kiu certe meritis iom pli da atento ankaŭ nunatempe.

\**Ricmanje* en la slovena, estas vilaĝeto (5 900 enloĝantoj) apartenanta al la komunumo *San Dorligo della Valle*, ĉe la landlimo kun Slovenujo.

## Alta financo

Esplorado de la Proverbaro Esperanta daŭre surprizojn rezervas: fakte kelkaj proverboj ŝajnas tute bone aplikeblaj ankaŭ al nia epoko.

Vi certe memoras, kiel ĵurnaloj, revuoj, televido, terure konfuzis nin dum longa tempo pri la financa krizo, kiu startis je la fino de la 2008<sup>a</sup> jaro en Usono, eĉ kuntrenante bankroton de bankoj, de financaj agentejoj, de asekurkompanioj. Ĉio startis pro la longtempaj pruntoj por aĉeti domojn, kiujn tre facile senskrupulaj bankistoj disponigis al homoj sen sufiĉaj garantioj pri pageblo. Tiuj misaj obligacioj, pere de financaj "ĵonglaĵoj", fariĝis tute novaj "financaj produktaĵoj" nome la famaj "rubaĵ-biloj", kiuj freneze estis interŝanĝitaj tra la movebla merkato. Duobla kialo gvidis tian ege rapidan interŝanĝon: unue, tuj forliberiĝi je la financa risko; due, akiri la bankan makleraĵon.

**Eksministro** - Du judoj transiris la ŝoseon en malpermesata loko. Tiam policano aliris ilin kaj komencis skribi monpunan raporton.

Demandis lin la unua judo: "Ĉu ankaŭ eksa ministro devas pagi punmonon?"

"Ne, pardonon", diris la policano. Li disŝiris la dokumenton kaj foriris.

Tiam la dua judo demandis la unuan: "Ĉu vi vere estis ministro?"

Respondis li: "Tute ne, sed ĉu oni ne rajtas demandi?"

*El "Amantoj de judaj humuraĵoj"*

Kia la rezulto? En Usono, unuflanke multaj - milioj da homoj - malriĉiĝis, perdis domon, postenon, oficon, bankrotis; aliaflanke, ege malmultaj - centoj aŭ dekoj da bankestroj, direktantoj - sukcesis gajni. Sed tiu krizo, samkiel uragano aŭ epidemio, disvastiĝis tra la tuta mondo, damaĝante grandajn kaj malgrandajn ekonomiojn, kaj ankoraŭ nuntempe daŭras la sekvoj, ankaŭ en Italio, samkiel en Eŭropo.

Ĉio ĉi revenis en mia memoro kiam mi renkontiĝis kun la proverbo:

### 671— Groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! Milojn ŝtelis - financisto.

Fakte ne estas novaĵo, ke malriĉa homo kiu alproprigas al si frukton aŭ eĉ panon pro malsato, kiam kaptita, estas procesata kiel ŝtelisto. Dume bankisto aŭ direktanto, kapablaj gajni per tiuj supre menciitaj "ĵonglaĵoj", eĉ malriĉigante la aliulojn, ĉiam estas ŝatataj "grandaj financistoj". Tra la mondo. Ekde ĉiam.

**Viglo**



## Laste trovi taj!

Mi esperas, ke tiu ĉi nova rubriko vekos vian intereson pri la malnovaj kartoj priesperantaj kiuj cirkuladis tra la mondo, precipe en la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento.

Per la ĝis nun aperintaj en TEA-Bulteno ekestis intenco de la redaktanto atentigi, krom pri la historia valoro, ankaŭ pri la ĉarma grafikaĵo kaj foje naiva prezentmaniero de la internacia lingvo Esperanto.

Sed ni komencu de la ... komenco: unue, oni devas scii, ke la tiel nomata "poŝta karto" datas de la 19<sup>a</sup> jc. La unua en la tuta mondo estis eldonita de la aŭstria poŝto, nomita "Correspondenz-Karte", je la 1<sup>a</sup> de oktobro 1869, probable far de iu profesoro de la Militakademio en Vieno. Per ĝi oni intencis anstataŭi, por la tiel dirita "mallonga korespondaĵo", la leterojn kiuj havis plikostan tarifon. La karto, el maldika kartoneto, estis eburkolora: sur unu flanko, spaco por la adreso de ricevonto kaj surprisita poŝtmarko, dum sur

la alia, spaco por skribi mesaĝon ne pli ol 20-vortan. Tiu epokaj kartoj do estis "tutaĵoj", nome jam afrankitaj; nur kelkajn jarojn poste aperis kartoj kun koncerna spaco por alglui poŝtmarkon. La ilustrita karto aperis ĉ. en 1870, danke al iu libristo el Francujo kiu ekhavis la ideon ornamu per desegnoj kaj figuroj la kartonetojn, kaj poste, iom pli malfrue, alia franco, Dominique Piazza, kreis la unuajn kartojn kun fotoj (1891). Ĉi-tiel, koncize, skize kaj tre supraĵe klarigite, komenciĝis la historio de "Poŝtaj kartoj". Sed, kial "Poŝta karto"? Ne ĉar temis pri nur poŝtaj eldonoj, sed simple ĉar estis subkomprenite, ke la poŝto ĝin akceptis kiel korespondobjekton. La novaĵo konsistis el tio, ke tiu karto ne devis esti enkovertigita, ke ĝi rajtis vojaĝi tia kia ĝi estis, de sendinto al adresito, je speciala favora tarifo.

Kaj nun ni parolu pri Esperanto-poŝtkartoj. Amaso da ili, ĉu humuraj, ĉu kun portretoj de pioniraj gravuloj, aŭ pri kongresoj, ĉu propagandaj, ĉu

I. — Voyage à travers l'Europe et l'Afrique du Nord.  
W. Conrad, membre du Groupe espérantiste de Berlin, a décidé d'entreprendre un voyage à pied à travers l'Europe et l'Afrique du Nord, dans le but de propager l'Espéranto. Départ de Paris le 28 avril 1911.  
— Apprenez la langue internationale « Espéranto ».

II. — Viaggio attraverso l'Europa e l'Africa del Nord.  
Il Sig. Conrad, membro del gruppo Esperantista di Berlino, ha deciso d'intraprendere un viaggio a piedi attraverso l'Europa e l'Africa del Nord, con l'intenzione di propagare la lingua « Esperanto ». Partenza da Parigi il 28 Aprile 1911.  
— Imparate la lingua internazionale « Esperanto ».

III. — Vojaĝo tra Eŭropo kaj Norda Afriko.  
W. Conrad, ano de la Berlina esperantista grupo, decidis entrepreni vojaĝon piede tra Eŭropo kaj Norda Afriko, por propagandi Esperanton.  
Foriro de Parizo la 28<sup>an</sup> de Aprilo 1911.  
— Lernu la helpan lingvon « Esperanto ».



Propaganda karto, eldonita de W. Conrad, ano de la berlina esperantista grupo. Li piedvojaĝis tra Eŭropo kaj Norda Afriko, propagandante Esperanton. La vendo de la PK helpis por lia vivteno dum la tuta irado. Li foriris de Parizo la 28<sup>an</sup> de aprilo 1911. Ekzistas ankaŭ alia foto de li pozanta ĉe la Placo Sankta Marko, en Venecio.

lernigaj ĉu fakaj ktp, ekaperis unue eldone de kelkaj francaj esperantistoj, jam en 1902<sup>a</sup> jaro. En 1999 estis presitaj du tre interesaj, A5-formataj, libretoj kun po ĉ. 80 paĝoj, fare de la revuo "Franca Esperantisto". En tiuj estas enlistigitaj la kartoj ĝis tiu jaro aperintaj en Francio. La titolo estas: "Vagante tra la francaj Esperanto-Poŝtkartoj". Tekston kaj bildojn disponigis s-ro Jean Amoureux, elstara filatelisto/historiisto, en kies arkivo troviĝas netakseble valora materialo. En sia postparolo, fine de la dua libreto, pri tio ĉi li atentigas: "... Vagado tra poŝtkartoj estis longa kaj instruveka vojaĝo... (tiuj kartoj) estas plia pruvo pri la riĉeco de nia historio kaj de nia kulturo..." Do, ĝuste tio ĉi estas la celo de ĉi rubriko: per kuriozaj, foje eĉ ridindigaj, alifoj tre dramaj bildoj, preskaŭ ĉiam tamen elstare artismaj, ni sekvu la spurojn de niaj antaŭuloj, de tiuj kiuj, siamaniere, perbilde, alforĝis nian historion.



Eldonita post la 1<sup>a</sup> mondmilito, laŭ desegno de Noël Ottavi, de Societe Francaise de Propagande de l'Esperanto (SFPE). "Radiofonio nepre bezonas Esperanton"

### 4<sup>a</sup> Internacia Konkurso—jaro 2010 pri la temo: Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj. Oni sendu, ĝis la **15<sup>a</sup> de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso: TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO - Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia. Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la jenaj kategorioj: **Kat. 1)** Desegnaĵo (ekz: "kiel mi imagas tiun tradician feston", "la Kristnaska Kripo", "familia festo"); **Kat. 2)** Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...); **Kat. 3)** Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo). La "rakonto" aŭ "poeziaĵo" estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj. Por ĉiu verko estu indikitaj: persona kaj familia nomoj; aĝo; lernejo kaj klaso; poŝta adreso. Laŭeble, oni sendu malgrandan foton de la aŭtoro.

Ĉiuj konkursoj prezentigos al publiko dum la kristnaska periodo 2010. La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste. Pluaj informoj riceveblas rete aŭ poŝte.



# El Esperantujo: diverstemaj kaj diverslandaj informoj

## HELPO AL ESPERANTO-BIBLIOTEKOJ

Por la 14<sup>a</sup> fojo Esperanto-bibliotekoj povas peti de UEA subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. La subvencioj estas celitaj al bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtato, urbo aŭ simila instanco. Subvenciojn oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis librojn je la valoro de 115 ĝis 260 eŭroj.

Oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Diskoj k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15<sup>a</sup> de oktobro papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ rete al [direktoro@co.uea.org](mailto:direktoro@co.uea.org).

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bazan bonharon de la fondaĵo, eblas konatiĝi per la retejo [www.poulthorsen.dk](http://www.poulthorsen.dk).

## PROGRAMEROJ DE LA HAVANA UK EN LA RETA KINEJO

Multaj programeroj de la 95<sup>a</sup> Universala Kongreso en Havano estis filmitaj kaj la registraĵoj aperos iom post iom en la Reta Kinejo de UEA. La laboro estas farata volontule kaj etendiĝos verŝajne tra du-tri monatoj. Kiel la unuajn la filmisto Francisco L. Veuthey finpretigis la programerojn "La nova Estraro sin prezentas" kaj "La Centra Oficejo respondas", kiuj jam estas videblaj.

Reta Kinejo de UEA: [www.ipernity.com/doc/97850/home/video](http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video)

## E-ORGANIZAĴO POR UN EKFUNKCIAS

En la Havana UK estis anoncita la fondo de la organizaĵo "Esperanto por UN", kiu laboros por altigi la profilon de Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj por disvastigi informojn pri UN inter la esperantistoj.

UEA havas formalajn rilatojn kun UN kaj Unesko jam ekde la jaro 1954. Per sia oficejo en Novjorko, ĝi flegas tiujn kontaktojn kaj en Parizo, Ĝenevo kaj Vieno laborgrupoj faras similan laboron. De tempo al tempo UEA prezentas sian vidpunkton pri lingvaj demandoj en kunsidoj kaj konferencoj de UN kaj Unesko. UEA ankaŭ mem organizas konferencojn kaj seminariojn en tiuj urboj kaj aliloke por atentigi pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala interhoma komunikilo kaj pri la problemo de lingva malegaleco ĝenerale.

La nova organizaĵo, por sistema informado pri UN inter la esperantistoj, lanĉos Esperantan retpaĝaron pri UN kaj Unesko. Ĝi argumentos por subtenado de UN per informado al publiko pri ĝia valoro, instruado pri UN en la lernejoj, konsciigo pri la valoro de internacia ordo, kaj laboro por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn. *Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## Unuagradaj kursoj de esperanto en TEA

Startos vendredon la 1<sup>an</sup> de oktobro je la 20<sup>a</sup> h. unua renkontiĝo kun lernemuloj: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj. Diskonigu vaste, dankon!

## Kajo en Budapeŝto pri Valdemar kaj Nina Langlet

La hungaria Fondaĵo "Carl Lutz" en la jaro 2005 faris peton al la ĉefurba konsilia asembleo, renomi la kajon apud la rivero Duna en Budapeŝto kaj per tio omaĝi al la martiroj kaj herooj kiuj savadis la persekutatojn dum la sagokruca teroro en 1944.

La 3<sup>an</sup> de junio de tiu ĉi jaro la Ĉefurba Konsilio de Budapeŝto traktis la temon, kaj per decido oni nomumis la kajon en la urboparto Buda inter la pontoj Szabadság kaj Petőfi pri esperantistaj geedzoj - Valdemar kaj Nina Langlet!

Pri ilia homsavada agado oni povas legi novan Elingvan studon de Rát-kai Árpád ĉe <http://www.esperanto.hu/egyeb/langlet-eo.doc>

*laŭ komuniko de MTI (hungara novaĵagentejo)  
Novaĵservo kun selektitaj E-novaĵoj: RET-INFO*

## Esperanta Vikipedio kun pli ol 450.000 artikoloj

En eĉ ne du monatoj, WikiTrans tradukis 300.000 artikolojn de la angla Vikipedio al surprize bona, eĉ se ne senpeka Esperanto. Post jaro oni probable atingos tri milionojn. "... La WikiTrans-projekto estas esplor- kaj evoluigo-projekto de la dana lingvoteknologio-firmao *GrammarSoft ApS* [Eckhard Bick], kunlabore kun *University of Southern Denmark*. La ĉefa celo de la projekto estas permesi translingvan uzadon de Vikipedio-artikoloj, pere de paralela tradukita retejo.

Unuavice la ideo estas oferti aliron al la plej granda Vikipedio el ĉiuj - la angla, kun pli ol 3 milionoj da artikoloj - en Esperanto kaj la dana. Kvankam ambaŭ lingvoj estas inter la pli grandaj Vikipedioj, iliaj, po ĉ. 130.000, artikoloj konsistigas nur modestan kolekton kompare al kio haveblas en la angla. Krome, la individuaj artikoloj estas ofte multe pli malgrandaj ol iliaj anglaj analogoj, malpli dense fontigitaj aŭ simple t.n. "ĝermoj". ...


... Vi certe trovos ankorau multajn aliajn pridiskutindajn aspektojn. Sed ŝajnas al mi klare, ke la tuta Vikipedia agado devas esti profunde repensita. Ĉu nova prioritato ne devas esti korekti la tradukojn anstataŭ mem ekverki? Kaj se oni originale ekverkas, ĉu oni ne prioritare verku pri verdlandaj, esperantaj "naciaĵoj", kulturo ktp. ne troveblaj en la angla Vikipedio?..."

La tuta artikolo estas legebla en la blogo de Bernhard Pabst ĉe <http://www.ipernity.com/blog/37943/248693>

*fonto: Ret-Info*

## Dimanĉon la 12<sup>an</sup> de septembro 2010 Festo de Amikeco sur Monto Forno

Sur la Trilanda Pinto, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj el Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Piedgrimpemuloj estos atendataj ĉe la telfera stacio ĉ. je la 10<sup>a</sup> horo. Rendevuo ĉe la simbolo ekde la 12<sup>a</sup> horo. Tie Martin Stuppnig bonvenigos vin!



Tiel mi kuiras!  
Kaj vi?

Ĉifoje mi proponas du receptojn, ambaŭ italajn, kiujn varme mi rekomendas elprovi: mi certas ke danke al tiuj ĉi pladoj aplaŭdojn kaj senfinajn laŭdojn vi ricevos de viaj familianoj, amikoj, esperantistaj kaj neesperantistaj... Volonte mi aŭskultos viajn komentojn kaj precipe akceptos viajn kontribuojn, precipe el eksterlando.



### Cepoj en forno

#### INGREDIENCOJ

1 kg da mezgrandaj blankaj cepoj  
3 kuleroj da raspita pano  
4-5 kuleroj da raspita parma fromaĝo  
3 kuleroj da olivoleo  
origano k.b.  
salo k.b.

#### PREPARADO

Senŝeligu kaj kvaronigu la cepojn.

Metu ilin en rostujon, antaŭe oleumitan, je nur unu tavolo.

Ilin salu kaj surŝutetu per iom da origano kaj per la raspitaj pano kaj fromaĝo, intermiksitaj.

Kovru la rostujon per alumina folio, kaj enfornu je 200 gradoj da temperaturo dum ĉirkaŭ 15 minutoj.

Post tiu tempo kontrolu ke la tuto ne tro sekiĝu; eventuale, se bezonate, aldonu duonan glason da akvo.

Daŭrigu la kuiradon dum kromaj 15 minutoj, deprenu la aluminian folion, kaj brunigu la surfacon 10 minutojn.

Surtabligu kaj ... Bonan apetiton!

## ESPERANTA TURISMA SOCIETO LJUBLJANA - SLOVENIO

kore invitas vin al

**TURISMA RIKOLTADO DE OLIVOJ EN IZOLA**  
sabaton la 16<sup>an</sup> de oktobro 2010




De la 10<sup>a</sup> h. ĝis la 10h30 atendas vin ĉe la Hotelo RIVIERA kafo kaj "brioso". Tie estos donitaj kelkaj informoj pri olivaj kaj olivolea farado. Poste oni iros 3 kilometrojn pli malproksime, al Ronk, en olivarbejo, kie, post antaŭparoladeto pri olivarbaro en Slovenio, oni komencos rikolti la fruktojn per tradicia maniero, nome per "baligoj". Post plenigado de la unuaj kestoj, kuiristoj de Hotel Riviera alportos manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (kosto: po 30 eŭrojn).

Posttagmeze vizito de "San Simon" kaj ties marbordo, kaj aliaj vidindaĵoj en Izola mem.

Por glata funkciado de la aranĝo, bonvolu aliĝi kaj pagi antaŭ la 15<sup>a</sup> de septembro. Por pliaj detaloj kontaktu Elda aŭ, rete, Fani Riznar: fani.riznar@gmail.com

## "Ossibuchi" kun tomatoj

#### INGREDIENCOJ



2-3 bovidaj aŭ bovaj bifstekoj  
50 g da butero (aŭ 1-2 kuleroj da olivoleo)  
1-2 trunketoj da blanka ripocelerio  
1 cepo  
1 karoto  
250 ml da viandbuljono  
1 skatolo da pecigitaj tomatoj  
1 glaso da blanka vino  
faruno k.b.  
1 ajlero  
iom da hakita petroselo  
salo kaj pipro k.b.



#### PREPARADO

Salu iomete la bifstekojn kaj tuj poste ilin farunu. En larĝa kaserolo fandu la buteron (aŭ varmigu la olivoleon) kaj ilin rostetu ambaŭflanke, ĝis ties brunetiĝo. Intertempe haketu je etaj eroj la cepon, karoton, ripocelerion: aldonu la tuton al la bifstekoj en la kaserolon kaj daŭrigu la rostetadon. Post ĉirkaŭ 3-5 minutoj surverŝu la blankan vinon kaj kuiru ĝis ĝia elvaporigo.

Je ĉi punkto enmetu la pecigitajn tomatojn, la buljonon, salon kaj pipron. Kovru la kaserolon kaj je malforta fajro kuiru dum ĉirkaŭ unu horo (la elkuiro dependas kompreneble de la dikeco da la bifstekoj). Se la saŭco tro densiĝas, aldonu iom da akvo aŭ da buljono.

Kvin minutojn antaŭ la elkuiro, aldonu la haketitajn ajleron kaj petroselon, renversu du-tri-foje la bifstekojn en la kaserolo por ke ili alprenu guston kaj aromon de la aldonitaĵoj. Surtabligu la "ossibuchi"-n akompane de rizo, aŭ terpoma pureo aŭ aliaj legomoj, laŭ via plaĉo.

\*Ossobuco = tranĉitaĵo kun medola ostoj, el la kruro de bovo aŭ bovido.

## Aŭtunaj Karstaj Tagoj en Triesto: 29/10 - 1/11/2010

Provizora programo:

**Vend. 29 oktobro:** Ekde la 17<sup>a</sup> horo: akcepto de partoprenantoj, enhoteliĝo. Ĉe TEA-sidejo, prezentado de bildoj pri Karsto, babilado...

**Sab. 30-dim. 31 oktobro**

★ Didaktika Naturcentro en Basovizza, la "Nigra Groto", Valo Rosandra; rifuĝejo Premuda;

★ per „tramo de Opicina“, al Obelisko, promenado laŭ la t.n. pado „Napoleona“, laŭ „Fiŝista pado“ kaj en parko de Kastelo Miramar;

**Lun. 1 novembro** – itinero tra la urbo; post komuna tagmanĝo, tostado kaj ĝisrevidoj.

**Partoprenkosto** inkluzivos la kompletan programon: tio estas 3 tranoktoj, en dulita ĉambro, 5 manĝoj (trinkaĵoj aparte pagendaj), ĉiuj vizitoj kaj transportoj. Ĉiĉeronado esperantlingva. Eblas plilongigi la restadon, anoncu vian intencon.

Detaloj pri pagoj kaj definitiva programo riceveblas rete: esperantotrieste@yahoo.it; no-red@tiscalinet.it; telefone: +39 040350093; 040 398562; poŝte ĉe TEA (vidu je pĝ. 6<sup>a</sup>)

Septembra Programo	
03 vendredo	20h00 - Bonvenon al vi ĉiuj! Agadplanoj: aranĝoj kaj kursoj en Triesto
07 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo* Temo: "Esperanta Proverbaro"
10 vendredo	20h00 - Vivo kaj personeco de Valdemar Langlet, homsava aganto
12 dimanĉo	Festo de Amikeco sur Monto Forno (apud Arnoldstein - vd. je paĝo 4 <sup>a</sup> )
13 lundo	14h40 - Esperanto ĉe Alirprogramoj de RADIO UNO
14 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
15 merkredo	Vizito de Orienta Muzeo, en la Palaceto <i>Leo</i> ( <i>Via San Sebastiano 1</i> ): renkontiĝo je la 9h30, antaŭ la enirejo.**
17 vendredo	20h00 - Teatraĵo per televido: Dek Tagoj de Kapitano Postnikov
21 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo <b>Internacia Tago de Paco</b> : kunportu kaj legu poeziaĵojn pri la temo!
24 vendredo	20h00 - El Esperanta Gazetaro
28 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
Okobra Programo	
01 vendredo	20h00 - Starto de unuagrada kurso: prezento de la lingvo kaj enskribiĝoj
05 mardo	17h00 - Esperanta Proverbaro
08 vendredo	20h00 - Esperanto-krucvortoj
10 dimanĉo	De <i>Santa Croce</i> al <i>Samatorza</i> : Renkontiĝo ĉe la haltejo de buso n. 44, placo Oberdan, direkte al <i>Santa Croce</i> , akurate je la 9h20.**
12 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
15 vendredo	Vizito de Muzeo <i>Scaramangà</i> ** 20h00 - <b>Mongolaj aventuroj</b> videofilmo de Edvige
19 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
20 sabato	Olivrikoltado en Izola (detaloj pĝ 5 <sup>a</sup> )
22 vendredo	20h00 - <b>Blučielaj Mongolio</b> fotoj de Elda
23 sabato	"Promenante kun <i>James Joyce</i> " - ĉiĉeronino akompanos nin laŭ la vojoj frekventataj de tiu artisto. Renkontiĝo: placo <i>Unità</i> , ĉe la Fontano de la 4 Kontinentoj, je la 10 <sup>a</sup> horo (kosto 5 €)
26 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
29 vendredo	20h00 - Aŭtunaj Karstaj Tagoj
<p>BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  <b>Redaktanto:</b> Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com  <b>Sidejo:</b> Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17-19; vendrede 19-21  <b>Tel:</b> (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936  <b>Ret:</b> esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it  <b>Grupa ttt-ejo:</b> //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina  <b>Poŝta adreso:</b> Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italia  <b>Poŝtekonto</b> N° 10834349</p>	

**\*Pludaŭras la renkontiĝoj ĉiumarde, je la 17<sup>a</sup> horo.** Proponu mem la temojn kaj/aŭ viajn dezirojn: ĉu gramatikajn, ĉu literaturajn, ĉu tradukajn ktp. Ĉio ajn povas utili por plibonigi nian esprimkapablon en Esperanto, konatiĝi kun literaturo kaj movado, plivastigi nian personan vortaron. Mi akceptas entuziasme viajn kritikojn pri redaktado de la bulteno, kiel same viajn kontribuojn.

### Por koni pli bone Trieston!\*\*

Kiel antaŭ la somera periodo, denove ni programas vizitojn de urbaj muzeoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj de Triesto. Detaloj estas en la programo aŭ haveblas de Elda, sed estas REKOMENDITE, ke kiuj intencas partopreni en la muzea/ekskursa programo, NEPRE sinanoncu al **Rosanna**: tel.num. 040 43864; 340 3603291. Kaze de malbona vetero, vizito de muzeo same okazos, sed ne la ekskurso.

### Muzeo pri Orienta Arto

Ĉi tiu Muzeo, inaŭgurita la 8<sup>an</sup> de marto 2001, estas la unua muzeo specife dediĉita al orienta arto en la tuta regiono Friulo Julia Venetio. Ĝi sidejas en la historia, 18-jarcenta Palaceto *Leo*, en la plej antikva kvartalo de Triesto. La Palaco, iama proprajĝo de patricia triesta familio, estis transdonita al la Komunumo de Triesto de la grafino *Margherita Nugent Laval* en 1954, kune kun la eksa preĝejo Sanktaj *Sebastiano* kaj *Rocco*.

En ĝi troviĝas ne nur kolektoj de orientaj artaĵoj, sed ankaŭ vojaĝaj memoraĵoj, armiloj, muzikiloj, etno-arkeologiaj trovitaĵoj, devenantaj el la tuta Azia areo, ĉefe el Ĉinujo kaj Japanujo, kaj valorajĝoj donitaj al la Urbaj Muzeoj pri Historio kaj Arto ekde la dua duono de la 19<sup>a</sup> jarcento.

**Merkrede la 15<sup>an</sup> de septembro - h. 9.30**

### Muzeo Giovanni Scaramangà di Altomonte

*Giovanni Scaramangà* (1872-1960), posteulo de nobla, antikva, grekdevena familio, eminenta personeco en la ekonomia kaj kultura medio de Triesto en la unua duono de 1900, estis Konsiliano kaj poste Prezidanto de la Komerca kaj Industria Ĉambro.

Lia nomo aperas en la administraj konsilioj de bankoj, asekur- kaj navig-kompanioj, komercaj entreprenoj, sportaj kaj industriaj societoj. De post 1947, li nur dediĉadis sin al kulturaj aktivecoj: li estis pasia, tre rafinita kaj sperta kolektanto de antikvaj dokumentoj kaj objektoj, ĉiuj ligitaj al la historio de Triesto.

En la kolekto *Scaramangà* troviĝas nombraj, tre valoraj, historiaj pecoj: grafikaĵoj, geografiaj mapoj, libroj, inkunabloj, papaj buleoj, manuskriptoj devenintaj el la Benediktana Monaĥejo de Sankta *Cipriano*, meblaro kaj manfaritaĵoj el 1800, medaloj, moneroj, pentraĵoj, horloĝoj, operlibretoj, sakralaj libroj kaj ornatotoj, taglibroj kaj notlibretoj de famaj triestanoj, aŭtografoj ktp. La tuta materialo estas dividita en sekcioj kaj surslipigita de la bibliotekisto *Camillo de Franceschi*. La Muzeo, kiu, ĉiujare, ekspozicias la kolektan materialon laŭ diversaj temoj, estas lokita en la palaco en kiu iam loĝis *Giovanni Scaramangà*.

Vizitebla nur por grupoj: tial nepre anonciĝu ĉe Rosanna - **vendr. 15<sup>an</sup> de septembro, h. 10.00**